

Vertikale

**Periodaĵo por la aktivuloj
de Flandra Esperanto-Ligo (FEL)**

**Tijdschrift voor de actieve leden
van de Vlaamse Esperantobond vzw**

**Numero 34
oktobro 2004**

Enhavo

Kernestraro - 1 junio 2004	3
Algemene Vergadering - 25 septembro 2004	5
Regularo de interna ordo	9
Regularo pri la lokaj grupoj	12
Regularo pri la ĝenerala membrakunveno	15
Regularo pri la estraro	19
Regularo pri la proceduro de estrarelektoj	22
Buĝeto 2005	27

Oficejo

La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140 en 2000 Antwerpen. Ĝi estas malfermita por la publiko principe ĉiun labortagon inter la 9a kaj la 12a30 kaj inter la 13a30 kaj la 17a30. Vizitontoj bonvolu nepre anticipe interkonsenti pri rendevuo.

Telefono (ofichoroj): 03 / 234 34 00

Telekopio (tagnokte): 03 / 233 54 33

E-poŝto: fel@fel.esperanto.be

Interreto: www.esperanto.be

Vertikale

Periodaĵo por la geaktivuloj de FEL. Abonoj ĉe FEL.

La ĝenerala respondeco de la revuo restas ĉe la redaktoro, la aŭtoroj mem respondecas pri siaj propraj artikoloj aŭ raportoj, kaj la enhavo de ili ne devas kongrui kun la opinio de la redaktoro.

Korespondadreso: Vertikale, Roland Rotsaert (rotsaert@esperanto.be), p.a. Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Kunveno de la kernestraro, FEL, mardo 1 junio 2004, 18.00-21.00

Ĉeestas: Ivo Durwael (ID), Gerd Jacques (GJ), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR - protokolis), Marc vanden Bempt (MVDB), Lode van de Velde (LVDV).

1. Financoj

Post diskuto, la ĉeestantoj konkludas ke - eligante la esceptajn en- kaj elspezojn kaj la flandran subvencion el la librotenado - la FEL-spezokonto de la pasintaj jaroj montris proksimume ekvilibron. RR konsentas, sed rimarkas ke la sumo de deskriboj jam de jaroj estas tre malgranda, ĉar apenaŭ okazis investoj. Kun la normale necesaj investoj la deskriboj estus multe pli altaj. Li taksas ke la reala jara deficino estas pr. 10.000 EUR. PP laŭ alia metodo venas al simila sumo. Oni konsentas preni tiun sumon kiel elirpunkton por la diskuto pri la trovotaj pliaj enspezoj.

ID konstatas plurajn starpunktojn:

- PP dum multaj jaroj vidis multajn planojn por plibonigo, el kiuj neniu realiĝis. Kial nunaj planoj sukcesos?

- Laŭ RR urĝe necesas kompleta ŝanĝiĝo/renovigo (do investo) de librotenado, administrado...

- LVDV (kaj parte ID) emas vidi relative simplajn, rapidajn solvojn.

- ID kaj GJ konstatas ke dum la pasintaj krizoj ĉiam troveblis solvo.

- ID vidas ke iuj lokaj grupoj kun limigita, sed bone kunlaboranta teamo, sukcesas realigi gravajn projektojn. La nuna kernestraro povas labori pli kohera ol granda estraro kaj atingi pli da rezultoj.

Laŭ RR baza ero de la sukceso estas pli bona administrado/librotenado. Dum jaroj vane estis serĉata nova librotena programo. Li proponas esplori la eblecojn de mySAP, kvankam ĝi estas ege multekosta (pr. 500 EUR/monate; ciferoj nun ne plu troveblas sur la SAP-retpaĝoj). MVDB krome atentigas pri la kostoj por enkonduko de la programaro. RR informpetos. [Posta esplorado montris ke SAP ne uzeblas por FEL.]

GJ kaj MVDB opinias ke pli akurata plenumo de la taskoj de la dungitoj (werkbladen, fakturado) jam parte povas solvi la problemojn.

2. Ideoj pri enspezoj

ID dissendis liston kun la proponoj pri ŝparoj kaj pliaj enspezoj kiujn faris la kerno. Li petas la ideojn de la kerno pri la proponoj por pliaj enspezoj. Plej subtenataj kaj plej esperdonaj estas jenaj:

(1) Varbado por Monato

Tia varbado daŭre (kvankam neregule kaj neordigite) okazas. Ĝi apenaŭ sukcesas kompensi la ĉiujare forfalantajn abonantojn de Monato. (Monato-enspezoj en miloj da EUR: 2001: 74,4; 2002: 66,9; 2003: 64,7.) Estas bezonata intensa kampanjo kun novaj ideoj, kiu pligrandigu la abonantaron je kelkcentoj.

(2) Libroservo - propraj eldonoj

La propraj eldonoj estas plej profitdonaj, sed stagnas, ĉar ĉiuj fortoj (ĉefe de volontuloj) estis dediĉitaj al eldono de nova vortaro. La vortaro baldaŭ estos preta kaj disponeblas tempo por okupiĝi pri la atendataj manuskriptoj.

(3) Propraj Esperanto-aranĝoj: kursoj, kongresoj

(4) Vojaĝoj: Laŭ ID povas multon alporti, sed ankaŭ estas grandaj riskoj.

La kerno decidas prioritare okupiĝi pri tiuj 4 projektoj. Estas atendataj detalaj proponoj por ilia realigo kaj listo de personoj (volontuloj) kiuj povas gvidi kaj kunlabori. En Horizontaal aperos artikolo pri tio, por serĉi volontulojn ankaŭ ekster la kutima rondo de FEL-kunvenoj. Krome, estas proponita Horizontaal-serio pri ĉiufoje unu ero kun sugestoj kaj eblecoj de volontulaj laboroj aŭ ekzemploj de volontulaj sukcesaj agoj.

MVDB taksas ke la kvar projektoj povas alporti pliajn enspezojn de 5.000 ĝis 7.000 EUR.

RR opinias ke la enspezoj pro la ekvendado de la nova vortaro (kiu principe nenion kostas, ĉar ĝi estas financata per heredaĵa fonduso) povas kovri la restantan deficon dum la 'transira' periodo. Utilus, okaze de ĝia prezento, rememorigi ke ĝi eblis pro heredaĵo.

Jenaj proponoj estas valoraj, sed havas malpli grandan prioritaton:

(5) Grafikaj laboroj: PP kaj RR estas skeptikaj, ĉar FEL ne povas liveri sufiĉe bonan kvaliton.

(6) Reklamvarbado: necesas trovi personojn kiuj kompetentas pri tio.

(7) Lingvokursoj kaj prelegoj por ekstera publiko.

3. Ideo de RR pri E-libromarkato

RR konstatas ke la funkciado de la E-libromarkato estas tute neracia. Cento da eldone-

joj eldonas jare kune pr. 220 librojn (laŭ jara statistiko de A. Korjenkov, La Ondo). La tuta valoro verŝajne ne superas la vendociferon de mezgranda nacilingva librovendejo. Distribusistemo povus esti multe pli efika.

Esplorindas kunfandiĝo de la libroservoj de UEA kaj FEL, kiuj - el monda vidpunkto - estas najbaraj. Tio povus havigi spacon en la UEA-domo kaj doni plian bazan enspezon al FEL. [La proksimumaj jaraj enspezoj en miloj da EUR: FEL: libroservo 20; propraj eldonoj ? ; UEA (2003): libroservo 120, propraj eldonoj 17,7 - post kontrolo evidentiĝas ke la diferenco inter FEL kaj UEA estas multe pli granda ol RR supozis dum la kunveno.]

Krome li proponas ke volontulo(j), en kunlaboro kun FEL, kreu detalan datumbazon pri ĉiuj nove aperintaj libroj. Se ĝi estus ligita al la libroservo de FEL, ĝi povus alporti klientojn por la libroservo. PP respondas ke tia servo (en embria formo) jam ekzistas ĉe FEL: la listo 'nova' (nova-aliĝo@fel.esperanto.be).

Verlag van de algemene vergadering, Oostende, 25 september 2004

Aanwezige leden van de algemene vergadering: Ivo Durwael, Agnes Geelen, Eddy Raats, Johan Van Eenoo, Katja Lödör, Marc Cuffez, Frederik Van den Brande, Jean-Pierre Allewaert, Henri Schutters, Jan Doumen, Eric D'Hondt, Rob Ebenau, Flory Witdoeck, Walter van den Kieboom, Frans Croon, Wim De Smet, Lode Van de Velde.

1. Opening

Ivo Durwael opent de vergadering en verklaart in het kort de nieuwe vzw-wetgeving, die o.a. gevolgen heeft voor de algemene vergadering, namelijk dat enkel effectieve leden (administrant) stemrecht hebben en de andere aanwezigen 'publiek' vormen, zonder stemrecht.

2. Budget 2005

Roland Rotsaert stelt het budget voor en geeft nadere uitleg. Hij vestigt er de aandacht op dat 2005 het laatste jaar is dat de VEB voor zijn voortbestaan een beroep kan doen op reserves (in casu de reserve - uit een erfenis - voor de uitgave van het woordenboek). In 2006 zullen er geen reserves meer zijn en zal er niets meer te besparen vallen. Het budget wordt unaniem aanvaard met één onthouding.

3. Werkplan 2005

Lode Van de Velde leest het werkplan voor. Ivo Durwael benadrukt het feit dat we moeten zien het gat te vullen dat ontstaat door het wegvallen van de subsidies van Volksontwikkeling. De meest geschikte en efficiënte manier zal zijn om het aantal Monato-abonnees op te trekken.

Elk lid kan hiertoe bijdragen:

- informatiemateriaal verspreiden op congressen, eventueel via de plaatselijke boeken-dienst;
- achteraf adressenlijsten bezorgen aan het Esperanto-centrum om een proefnummer op te sturen;
- bij een verjaardag van een Esperanto-spreker eens geen wijn of bloemen geven (wat toch vergankelijk is), maar in de plaats een boek(enbon) of een abonnement cadeau doen. Bij de VEB zijn abonnementbons verkrijgbaar voor Monato (1/4, 1/2 of 1 jaar). Dit kan uiteraard ook opgestuurd worden aan vrienden in het buitenland die jarig zijn of iets anders te vieren hebben (nieuwjaar e.d.)

Een voorstel van Wim De Smet wordt kort besproken: het idee is om Monato te sturen - naar Europese politici. Het idee is goed, maar het zou jammer zijn mocht het merendeel gewoon meteen in de prullenmand terecht komen. Daarom zal Flory (of andere vrijwilligers) eerst bij de politici peilen of er interesse is en bovendien feed-back vragen.

Het werkplan wordt aanvaard met 2 onthoudingen. Agnes merkt op dat ze vreest dat er een gebrek aan werkkrachten is om de plannen te realiseren.

4. Intern reglement

In 2003 werd een nieuw, beknopt intern reglement uitgewerkt van 2,5 pagina's (Vertikale 30, november 2003). Ivo Durwael verklaart de noodzaak van een nieuw, beknopt en handelbaarder reglement dan het originele document (Vertikale 12, maart 1996) dat 22 pagina's omvat.

Dan wordt gestemd over de volgende mogelijkheden:

- de beide bewaren, waarbij het omvangrijke enkel geraadpleegd wordt ingeval van discussie of ontoereikendheid, en mits aanpassingen (vereenvoudigingen), die Ivo Durwael heeft verzonden aan de effectieve leden, maar waarop niemand wijzigingen heeft voorgesteld;
- de beide niet bewaren (dus slechts één van de twee).

Uiteindelijk stemmen 13 leden vóór het gebruik van beide reglementen, 2 stemmen tegen gebruik van beide reglementen en er is 1 onthouding.

Het nieuwe, bondige reglement werd dus aanvaard als werkreglement, terwijl het oudere - maar aangepaste - enkel geraadpleegd wordt ingeval van discussie of ontoereikendheid. Ivo Durwael en Marc Vanden Bempt verzekeren dat het nieuwe reglement niet in tegenspraak is met het oudere. Ivo Durwael verduidelijkt dat het aangepaste oude reglement nu eenvoudiger en gemakkelijker toe-pasbaar is.

5. Mogelijkheden van FEL

Na een grondige analyse (in het kader van het Beleidsplan), werden volgende 4 prioriteiten opgesteld:

- Monats versterken;
- verkoop van boeken en uitgaves van Esperantoboeken verder uitwerken;
- internationale Esperanto-bijeenkomsten organiseren in Vlaanderen
- groepsreizen naar het buitenland organiseren.

De Monats-kampagne heeft hierin de hoogste prioriteit en werpt zijn eerste vruchten af: bij de start van de campagne hadden we 1250 abonnees van de papieren versie, nu 1283, dit zonder de nog te verwerken abonnees, geworven tijdens bijeenkomsten. (Voorlopig totaal 1351 indien men de elektronische abonnees meerekent.)

Als dit kan blijven stijgen, zijn we zeker op de goede weg.

Andere voorstellen, die oprezen uit de gezamenlijke rondvraag/brainstorming:

- Monats koppelen aan het lidgeld: bijvoorbeeld bijbetalen voor een ½ jaar, waarbij nieuwe leden éénmalig een volledig jaarabonnement zouden krijgen.
- Meer gevarieerde redactionele bijdragen om het tijdschrift te verrijken.
- Naar analogie met andere verenigingen: aan de ingang van een bibliotheek informatie verspreiden.
- Denken aan erfenissen: er is een mogelijkheid om geld beschikbaar te stellen, waarbij de donateur tijdens zijn leven toch ook nog kan beschikken over het geschonken kapitaal.
- Een felicitatiebrief sturen naar Gian Carlo Figiera als nieuw erelid van UEA.
- Ilja De Coster stelt de vraag of een beweging wel over een Grafisch Centrum kan beschikken, terwijl het onmogelijk is om de technologische evolutie in de druktechniek bij te houden. Hij heeft fundamentele twijfels bij de vraag of het verhogen van het aantal abonees wel een lange-termijnoplossing biedt.
- Een vriendenkring "amikoj de Esperanto" oprichten, voor mensen die sympathie hebben voor Esperanto, maar daarom de taal nog niet wensen te leren.
- De bibliotheek van Leuven kreeg een gratis abonnement en heeft sindsdien zelf het abonnement betaald aangezien het in het systeem geregistreerd werd. Een idee om verder uit te testen bij andere bibliotheken!

- Samenwerken met Esperanto Nederland om een gemeenschappelijk tijdschrift te maken, of een nieuw Benelux-tijdschrift opzetten om over belangrijke gebeurtenissen in de regio te rapporteren.
- Campagne voeren om Horizontaal in (school)bibliotheken in te voeren - meer naar families toegaan met het tijdschrift Monats, meer naar een jonger publiek gaan.
- Meer reclame werven voor Monats en Horizontaal: hiervoor vooral persoonlijke contacten aanwenden.
- Aan Stano Marcek vragen kruiswoordraadsels e.d. te bezorgen voor Monats.
- Abonnement op FEL-uitgaven uitwerken, zoals bij Stafeto.
- Premie voor de werver van het 1500e abonnement.
- Premie voor diegenen die bijvoorbeeld 10 nieuwe abonnees aanbrengen.
- Commissieloon voor aan dragers van abonnementen meer bekendheid geven.

Ivo Durwael beklemtoont dat het ging om een brainstorming, zonder analyse. Het kernbestuur zal nu uitzoeken welke voorstellen praktisch uitvoerbaar zijn.

6. Varia

6.a. In Frankrijk werd een politieke partij opgericht (Europa Democratie Esperanto), die 50.000 stemmen heeft gekregen in het Europees parlement. Henri Schutters stelt voor om ook in de andere landen een politieke partij op te richten. Het gegeven wordt beschouwd als een mededeling aangezien de Vlaamse Esperantobond politiek neutraal wenst te blijven.

6.b. Henri Schutters meldt dat een nieuw Zamenhof-Esperanto-Object (ZEO) wordt verwezenlijkt in Peer: men is begonnen met de bouw van een appartementsgebouw met twee torens, die elk een Esperanto-naam zullen krijgen: respectievelijk 'turo dekstra' en 'turo liva'. Het gaat om een definitieve beslissing.

6. c. NOLIMES meldt dat haar webstek (<http://users.skynet.be/sky53810/>) een zoekindex biedt, met meer dan 6000 links, waaronder 1000 in verband met Esperanto.

6.d. Aanpassing statuten: Zoals het nu is, eist de bank, conform de statuten, dat voor financiële documenten steeds twee bestuursleden tekenen voor elke financiële transactie. Dit belet het elektronisch bankieren, tenzij er wordt betaald voor een duur systeem dat elektronische handtekeningen toelaat. Dit kost veel meer dan een statuutwijziging (ong. 100 euro). Daarom zal een bijzondere algemene vergadering worden samengeropen om een statuutwijziging te stemmen.

6.e. Flory laat de prijs zien die de VEB ontvangen heeft voor de uitgave van 'Aventuroj de Pinokjo', dat verkozen werd tot 'Infanlibro de la jaro 2003'.

6.f. Flory vertelt kort over het na-congres bij Boulogne, dat ook Oostende zal bezoeken. Meer info hierover in Horizontaal van november 2004.

Lode Van de Velde, Secretaris.

Regularo de Interna Ordo**1. EFEKTIVAJ MEMBROJ**

1.1.1. Ĉiu loka grupo rajtas reprezentigi sin en la membraro de FEL per unu membro por ĉiu komenciĝinta kvindeko da membroj kiuj estas regule enskribitaj en tiu grupo je la 31a de decembro de la antaŭa jaro. La kandidatoj estu proponitaj al la sekretario de la Ligo antaŭ la fino de februaro.

1.1.2. La jenaj funkciuloj apartenas aŭtomate al la membraro, se ili jam ne estas delegitaj per sia loka grupo:

- la direktoro de la Flandra(j) Esperanto-Centro(j) (par. 7a de la regularo)
- la redaktoro(j) de la revuo(j) de la Ligo

1.1.3. Ĉiu aliĝinta faka asocio aŭ faka grupo rajtas sin reprezentigi en la membraro per unu membro.

2. ASOCIITAJ MEMBROJ

2.1. La asociitaj membroj de la Flandra Esperanto-Ligo povas esti

- ordinara membro (M)
- junulara membro (JM) = persono malpli ol 30jara
- familia membro (FM) = familiano de persono el la kategorioj M kaj JM kaj loĝanta je la sama adreso
- kursano (K)
- simpatianto (S)

2.2. Asociitaj membroj rajtas ĉeesti en la ĝenerala asembleo sed ne havas voĉdonrajton.

2.3. La asociitaj membroj aliĝu al la ligo pere de loka grupo aŭ rekte per pago de la kotizo al la kasisto de FEL. La kasisto de FEL komuniku la adresojn de rekte aliĝintaj membroj al la grupo plej proksima ĉe ilia loĝloko, tiel ili povos esti registritaj en tiu grupo.

2.4. La ĝenerala asembleo decidus ĉiujare, kiam ĝi fiksas la kotizojn, pri la revuo(j) sendata(j) al la membroj.

3. GRUPOJ, REPRESENTANTOJ KAJ FAKAJ ASOCIOJ AŬ FAKAJ GRUPOJ

3.1. Ĉiu loka Esperanto-grupo kaj ĉiu faka Esperanto-grupo aŭ faka asocio kiu deziras aliĝi al la Ligo, petas tion skribe al la sekretario de la Ligo. La peto devas esti subskribi-

ta de la prezidanto kaj de la sekretario de la petanta grupo aŭ asocio.

Al tiu peto estu aldonitaj:

- kompleta listo de la estraro de la grupo aŭ asocio
- en la kazo de faka grupo aŭ -asocio: la membro-nombro
- en la kazo de loka grupo: membrolisto kun familia nomo, propra nomo, naskiĝdato kaj adreso de ĉiu membro, eventuale kun nacieco kaj profesio.
- ekzemplero de la statuto aŭ ĝia projekto se tio ekzistas

3.2. En lokoj kie ne ekzistas loka Esperanto-grupo, la Ligo povas nomi reprezentanton kies tasko estas esplori la eblecon starigi lokan grupon.

3.3. La Ligo havu laŭprincipe nur unu grupon en iu urbo aŭ vilaĝo. Se ie unu aŭ alia grupo ŝajnas esti utila, la estraro de la Ligo povas akcepti tiun plian grupon.

3.4. Sur sia leterpapero, la lokaj grupoj menciuj: 'Sekcio de Flandra Esperanto-Ligo' aŭ 'Afdeling van de Vlaamse Esperantobond'.

3.5. Ĉiu loka grupo enkasigas ĉiujare la kotizojn kaj transpagas al la kasisto de FEL la parton destinitan al la Ligo.

3.6. Ĉiu loka grupo kaj ĉiu reprezentanto

- regule raportas al la sekretario de la Ligo pri sia aktiveco,
- informas la Ligon pri ĉia Esperanto-aktiveco en sia regiono (kurso, prelego, artikolo, ktp.)

3.7. Fakaj asocioj aŭ fakaj grupoj interkonsentas kun la estraro de FEL pri la kontribuo pagota al FEL.

3.8. Se okaze de likvido de iu loka grupo aŭ reprezentanta ofico, ties tuta proprietaĵo transiras al la Ligo, tiu proprietaĵo restas dum tri jaroj je dispono de eventuala novstari-gota grupo aŭ nova reprezentanto en la sama urbo aŭ vilaĝo.

4. ESTRARO

4.1. La estraro estas elektita de la efektivaj membroj.

Ĝi respondecas pri la informado pri Esperanto kaj tiurilate ĝi sekvas la direktivojn de la Universala Esperanto-Asocio. Ĝi prizorgas i.a. korespondajn servojn kaj kursojn, gazetaran kaj ekspozician servojn kaj eldonaĵojn. Ĝenerale ĝi faras ĉion kio povas disvastigi la konon de Esperanto.

4.2. La sekretario prizorgas la ĝeneralan korespondadon, sendas la kunvokilojn al la membroj por estrar- kaj ĝeneralaj kunsidoj, respondecas pri la protokoloj kaj la arĥivoj.

4.3. Por ĉiuj aliaj taskoj, la estraranoj interkonsentas pri la koncerna prizorganto.

4.4. La kasisto repagas la administrajn elspezojn konforme al la buĝeto. Por pagi neordinarajn agadojn, necesas antaŭa aprobo de la estraro.

4.5. La estraro rajtas dungi oficistojn kaj decidas pri ilia salajro.

4.6. Ĉiujare la de la grupoj proponitaj membroj, escepte de dungitoj, rajtas kandidatiĝi por posteno en la estraro. Ili faru tion ĝis fino de februaro per letero adresita al la sekretario de la Ligo.

5. VOĈDONADOJ

Ĉiuj decidoj estas alprenataj per simpla plimulto de la voĉoj, escepte en la laŭleĝe antaŭviditaj kazoj. Ĉe voĉegaleco, la voĉo de la prezidanto estas decidiga.

6. ESPERANTO-RENKONTIĜOJ

6.1. Laŭ ebleco, la estraro organizu ĉiujare kongreson aŭ semajnfinan aŭ unutagan renkontiĝon, kiu funkcias laŭ speciala regularo aprobita de la administrantaro.

6.2. Tiu kongreso aŭ renkontiĝo povas okazi ekster la nederlandlingva teritorio de Belgio.

7. FLANDRA(J) ESPERANTO-CENTRO(J)

7.1. Por pli efike realigi la celojn de la Ligo, la estraro povas starigi Esperanto-centro(j)n en la nederlandlingva teritorio de Belgio kaj en la Brusela Regiono.

7.2. La ĉiutaga laboro de tiu centro estas gvidata de direktoro, kiu agas laŭ la direktivoj de la estraro. Li estas nomita, kontrolata kaj eventuale maldungita de la estraro. Li rajtas ĉeesti ties kunsidojn. Li estu prefere, sed ne necese, salajrata por tiu ofico.

7.3. La aliaj oficistoj de la Flandra(j) Esperanto-Centro(j), ĉu salajrataj, ĉu volontulaj, agas laŭ la direktivoj kaj sub la kontrolo de la direktoro de la koncerna centro.

7.4. La Esperanto-centro(j) ne nur estas administra(j) ejo(j), sed ankaŭ centro(j) por la pristudado de la lingvaj problemoj kaj de ilia solvo.

Regularo pri la Lokaj Grupoj

A. ĜENERALAĴOJ

a. Kio?

1. Strukturitaj grupoj de personoj, kiuj favoras la disvastigon de la internacia lingvo Esperanto, rajtas esti lokaj sekcioj de Flandra Esperanto-Ligo, se ili plenumas la specifajn kondiĉojn por aparteni al FEL. La gvidantoj de FEL povas mem formi tiajn lokajn grupojn (ST. 3); sed ankaŭ grupoj, kiuj estiĝis el loka iniciato povas decidi aliĝi al FEL.

b. Kial?

2. La aliĝinta grupo havas per tiu aliĝo diversajn avantaĝojn, kiujn ĝi memstare apenaŭ povus havi: revuo por la membroj, publikigo de siaj programoj, dispono pri utilaj konsilioj kaj kunlaboro, aparteno al la tutregiona, al la tutlanda kaj al la tutmonda Esperanto-aktivularo, partopreno en diversaj aktivecoj, kiuj celas la disvastiĝon de Esperanto, reprezentiĝo en la FEL-membraro k.a. Aliflanke FEL petas de la membraro de la aliĝinta grupo iun financan kontribuon por la tutregiona funkciado.

Per sia aparteno al FEL la grupo ne perdas sian memstarecon kaj ĝi povas agi kiel ĝi mem deziras tiel longe, ke ĝi ne agas malkonforme al la celoj de FEL kaj malutile al la aktiveco de najbaraj FEL-grupoj.

c. Kiom?

3. Kvankam la nombro de lokaj grupoj de FEL principe estas nelimigita, en iu urbo prefere ekzistu ne pli ol unu FEL-grupo. Se tamen montriĝas akcepteblaj kaŭzoj por ke ekzistu pliaj, speciale se tiuj havus iun specifan celon, la FEL-estraro povas fari decidon tiusence.

Loka grupo povas krei apartajn subgrupojn por specifaj celoj, ekzemple subgrupo por personoj de la tria aĝo, kaj kiu povus havi apartajn programojn, sed tia subgrupo tiam ne havas la statuson de aparta FEL-grupo, eĉ se ĝi havus propran estrareton.

B. KONDIĈOJ

ĉ. Kiel?

4. Por ke grupo povu aparteni al Flandra Esperanto-Ligo ĝi devas plenumi jenajn kondiĉojn:

- a. konsisti el minimume kvin personoj de aĝo de pli ol 15 jaroj kaj apartenantaj al minimume tri. diversaj familioj;
- b. esti preta akcepti en sia membraro personojn de kiu ajn aĝo, vivkoncepto, profesio, intereso, lingvo, nacieco k.a., se almenaŭ tiuj personoj per sia konduto ne pruveble malutilas al la famo de la grupo aŭ de FEL;
- e. havi estraron de minimume tri personoj;
- ĉ. havi klaran nomon, ĉu en la nederlanda, ĉu en Esperanto, ĉu en la du;
- d. havi sian adreson ie en la flandra regiono de Belgio;
- f. pagi ĉiujare al FEL la deciditan kontribuon de la membroj;
- g. konsenti pri la rolo, kiun FEL deziras de la grupoj (ero 6).

5. Grupo kiu deziras aparteni al FEL devas:

- a. fari peton tiusenkan, subskribitan de la prezidanto kaj de la sekretario de la grupo kaj direktatan al la sekretario de FEL;
- b. indiki la kompletajn nomojn kaj adresojn de siaj tiamaj membroj plus ilian naskiĝojaron kaj eble ilian profesion;
- e. informi koncize pri la jam entreprenitaj agoj favore al la disvastiĝo de Esperanto;
- ĉ. informi pri la strukturo de la grupo; se ekzistas statuto aŭ regularo de la grupo ĝi estu aldonata.

La estraro de FEL pristudos la peton, formulos opinion kaj transdonos ĉi-tiun opinion al la FEL-membraro, kiu prenos la decidon. La FEL-sekretario informos la grupon pri la decido.

Se la aliĝpeto estas rifuzita, nova peto povas esti farata nur unu jaron poste.

d. Kiusence?

6. Larolo de la loka grupo rilate al FEL estas:

- transpigi deciditan parton de la membrokotizoj;
- raportoj regule pri la faritaĵoj (programoj de la kunsidoj; Esperanto-kursoj; festoj; iniciatoj k.a.);
- sugestoj iniciatojn, kiuj povus kontribui al la progreso de Esperanto;
- inviti estraranojn de FEL al specialaj aranĝoj;
- partopreni en la decidoj de FEL per la efektiva(j) membro(j), kiu(j)n la grupo rajtas delegi, nome unu delegito por ĉiu komenĉiĝinta kvindekda ordinaraj membroj;
- konigi sian apartenon al FEL en diversaj cirkonstancoj, ekzemple per indiko sur sia leterpapero.

C. APARTAJ ARANĜOJ

7. Pluraj grupoj el iu regiono povas decidi kunligi siajn fortojn kaj formi lokan ligan. Tiu formo de kunlaboro devas esti klare formulita en teksto, kiu devas esti akirinta la

aprobos de la FEL-estraro, speciale se ĝi enhavas erojn, kiuj havas influon sur la agado aŭ sur la financoj de FEL.

Tia ligo estas nur libervola intencdecido de kunagado; ĉiu el la aliĝintaj FEL-grupoj havas sian propran estraron kaj sian propran kason, kaj kelkajn proprajn programojn, kaj rajtas havi sian propran delegiton en la efektiva membraro de FEL. Neniu FEL-grupo el la koncerna regiono povas esti devigata aparteni al tiu ligo, se ĝi ne deziras tion. Ankaŭ devas resti la rajto de ĉiu al ĝi aliĝinta loka grupo eliĝi el tiu ligo se ĝi havas specialajn kaŭzojn por tio.

Tia ligo nur havas ekzistorajton se almenaŭ du grupoj apartenas al ĝi; ĝi aŭtomate malfondiĝas, se restas nur unu grupo. Sekve de tia malfondo ĝia bonhavo aŭ ĝiaj ŝuldoj transiras al la restantaj grupoj.

8. Grupo povas esti eksigata el FEL en unu el jenaj cirkonstancoj:

- a. se ĝi ne estas transpaginta la kontribuojn de siaj membroj al FEL kaj estas ricevinta du avertojn tiusenke;
- b. se ĝi entreprenas agojn, kiuj pruveble malutilas al la famo de FEL;
- c. se ĝi daŭre malfavore agas rilate al FEL-grupoj el la sama regiono;
- ĉ. se ĝi klare subtenas agojn, kiuj ne konformas kun la en la statuto de FEL formulita principo de neŭtraleco;
- d. se ĝia agado sur la kampo de neŭtrala internacia lingvo ne konformas kun tiu de la lingvo kiel ĝi estas iniciatita de doktoro L. Zamenhof, kaj kiel ĝi estas daŭre gvidata de la Akademio de Esperanto;
- e. se ĝi neglektas informi la FEL-estraron minimume unufoje en la jaro pri la vivo de la grupo;
- f. se ĝia membronombro malkreskas sub tri.

La FEL-estraro rajtas proponi tian eksigon, sed la FEL-membraro decidas pri ĝi. Antaŭ tiu decido, la koncerna grupo devas esti havinta la okazon defendi sin kontraŭ la akuzoj, kiuj kaŭzus ĝian eksigon. La eksigo estas definitiva ekde la dato de la decido de ĝenerala membrokunveno.

9. Loka grupo rajtas ekŝiĝi el FEL je pruvebla decido de sia membrokunsido. La ekŝiĝo devas esti komunikata al la FEL-prezidanto antaŭ la 1a de oktobro por esti valida je la 1a de januaro de la sekvonta jaro. Se en tiu periodo de tri monatoj la grupo sanĝas sian decidon kaj komunikas tion al la FEL-prezidanto, ĝi povas senprobleme resti en FEL.

10. Eksigita aŭ ekŝiĝinta grupo povas reveni en la sinon de FEL post oficiala peto kaj post akiro de la aprobo de du trionoj de ĝenerala membrokunveno. La FEL-estaro rajtas peti dokumentojn aŭ la ĉeeston de reprezentanto de la koncerna grupo por havi pli

klarlan ideon pri la seriozeco de la peto.

11. Loka FEL-grupo povas malfondiĝi en unu el jenaj cirkonstancoj:

- a. se ĝi preferas kunfandiĝi kun alia FEL-grupo, kiu estas preta akcepti ĝiajn membrojn, kasstaton kaj arĥivon;
- b. se ĝia membraro mem dum kunsido decidas pri malfondo;
- c. se ĝia membronombro ne plu atingas tri;
- ĉ. se ĝi ne sukcesas konsistigi estraron de minimume tri personoj;
- d. se ĝi ne plu sukcesas organizi ion konvenan;
- e. se eksteraj cirkonstancoj estas kaŭzintaj tion.

En kazo de vera malfondo (do sen kunfandiĝo) la kasenhavo estu transdonata al FEL, kiu konservos ĝin dum du jaroj je dispono de ebla novfondota grupo en la sama loko; se nova grupo tie ne aperas, la kasenhavo eniras en la kason de FEL. Aliflanke FEL ne respondecas pri eblaj ŝuldoj de la grupo je la momento de la malfondo.

Se FEL-grupo malaperas sen iu informo al la FEL-estraro, la FEL-estraro komisiu iun personon esplori surloke la cirkonstancojn kaj trovi solvon pri la kasenhavo.

12. Principe ĉiu FEL-membro apartenas al iu el la FEL-grupoj, kvankam Ii/Ŝi rajtas rifuzi tion. La membro mem elektu la preferatan grupon kaj konstatu ĉu Ii/Ŝi estas bonvena en ĝi. Se la membro mem ne faras decidon tiusence, la Esperanto-centro de FEL klasifas lin/ŝin en la grupon plej apudan de lia/ŝia loĝloko. FEL-membro povas cetere membriĝi en pluraj grupoj, sed nur unu inter ili estas lia/ŝia hejmgrupo.

13. Ekzistantaj organizaĵoj, kiuj havas rilatojn kun iu ajn formo de la Esperanto-movado kaj kiuj havas en la flandra regiono iun organizitan strukturon aŭ sian sidejon, povas iĝi kunlaborantaj grupoj de FEL kaj havi sian delegiton en la FEL-membraro. La kunlaborformo devas esti formulita en aparta konsentokontraĵo akceptita de ambaŭ flankoj.

Regularo pri la Ĝenerala Membrokunveno

1. KIO ESTAS LA ĜENERALA MEMBROKUNVENO?

La Ĝenerala Membrokunveno estas kunveno de la efektivaj membroj de FEL. Ĝi decidas pri la statutoj, pri la nomumo de la efektivaj membroj kiel reprezentantoj de lokaj grupoj, pri la nomumo de funkciuloj, pri la kooptado de membroj, pri la elekto de estraro, pri la aprobo de jarraportoj, buĝetoj kaj laborplanoj.

2. KIUJ ESTAS EN LA EFEKTIVA MEMBRARO?

Ekzistas kvar kategorioj da membroj:

- a. reprezentantoj de la de FEL dependantaj lokaj grupoj (vidu sube ero 3);
- b. la jenaj funkciuloj, kiuj aŭtomate estas membroj:
 - la direktoro(j) de la Flandra(j) Esperanto-centro(j);
 - la ĉefredaktoro(j) de la periodaĵoj de FEL (ne necese de la periodaĵoj eldonataj de FEL);
 - la reprezentanto de Flandra Esperantista Junulara Asocia (FLEJA);
- c. unu reprezentanto (voĉdonrajta) de ĉiu kun FEL kunlaboranta faka asocia aŭ grupo (vidu sube ero 5);
- ĉ. kooptitaj membroj (vidu sube ero 4).

3. REPRESENTANTOJ DE LOKAJ GRUPOJ

a. Kiuj?

Reprezentanto(j) de loka FEL-grupo en la membraro havas principe oficon de unu jaro kaj estas tiu(j):

- kiu(j)n tiu grupo (post atentigo fare de la estraro aŭ de la Esperanto-centro de FEL) indikas en sia membraro antaŭ la printempa ĝenerala kunsido; kaj
- pri kies elekto la sekretario (aŭ komisie de li: la Esperanto-centro de FEL) antaŭ la ĝenerala kunsido estas ricevinta informon de la prezidanto aŭ sekretario de tiu grupo.

b. Kiom?

Unu membro por ĉiu komenciĝinta kvindeko da membroj regule enskribitaj en tiu grupo je la 31a de decembro de la antaŭa jaro.

e. Kiaj?

La de la loka grupo indikita(j) persono(j) prefere estu tiu(j)), kiu(j) pro siaj spertoj pri Esperanto aŭ per sia sperto pri la Esperanto-movado aŭ pro sia rolo en la socio povas plej bone kontribui al la administrado de FEL. Necesas ankaŭ, ke ili povu veni al la membrokunvenoj.

4. DELEGITOJ DE KUNLABORANTAJ ORGANIZAĴOJ

Por la delegitoj de organizaĵoj kiuj havas iun kunlaborkonsenton kun FEL valoras la samaj reguloj kiel por la reprezentantoj de la lokaj grupoj. Ĉiu kunlaboranta organizaĵo rajtas tamen komisi nur unu delegiton. Pri iuj kunlaborkondiĉoj (ekzemple financaj)

FEL kaj la kunlaboranta organizaĵo interkonsentu ĉe la konsentodeklaro. Kondiĉoŝanĝoj bezonas la aprobon de ambaŭ grupoj.

5. KOOPTITAJ MEMBROJ

a. Kiu?

Kooptita membro estas tiu el la FEL-membraro

- kiu pro siaj meritoj en la Esperanto-movado aŭ en la socio indas aparteni al la membraro;
- kiun la estraro aŭ kiu ajn el la FEL-membraro proponas por tia elekto, se necese post atentigo pri la kvalikoj de tiu persono (rekte dum la elektokunsido aŭ per letero) aŭ kiu estas proponinta sin mem;
- kiu estas klare konsentinta pri sia kandidateco;
- kiun la Ĝenerala Membrokunveno akceptas per laŭkutima voĉdono.

b. Kiel?

La estraro esploru en la periodo antaŭ la ĉiujara elekto, kiuj valoraj personoj estus pretaj kandidatiĝi por esti kooptitaj membroj. Kandidatigo aŭ kandidatiĝo tamen restas principe ebla, ĝis la momento de la elekto.

La elektado povas okazi per aprobo de listo, kiun la estraro proponas. Sed se estas pli da kandidatoj ol la akceptebla nombro (vidu en "kiom?") aŭ se unu triono de la ĉeestantoj kaj reprezentitoj tion deziras, la elekto okazas per sekreta voĉdonado. La sinsekvo de la nombroj de la akiritaj voĉoj decidas pri la elektorezulto.

Se estas egaleco de voĉnombro por la indiko de la laste akirebla loko, nova voĉdonado devas okazi, sed nur rilate al la kandidatoj, kiuj estis akiritaj tiun egalan nombron. Se restas la egaleco, la voĉo de la prezidanto de la Ligo decidas.

c. Kiom?

La nombro de la per kooptado akceptitaj membroj devas minimume esti kvin, sed ĝi povus aliflanke ne superi la trionon de la suma nombro de la grupaj delegitoj plus la funkciuloj.

ĉ. Cetere valoras por la kooptitaj membroj la deziroj de punkto c de la delegitoj de la grupoj (vidu en ero 3). Kooptita membro malĉeestinta sen valida motivo la membrokunsidojn du fojojn en unu jaro prefere ne plu estu rekomendata en ia venonta laborjaro.

6. LA MEMBROKUNSIDOJ

a. Kiom ofte?

La membraro kunsidas tiom ofte, kiom la estraro bezonas ĝian intervenon. Ĝi ankaŭ devas esti kunvokata, se almenaŭ kvin membroj postulas tion. Ĝi certe kunsidas en printempo por la estrarelektoj kaj aprobo de la jarraporto pri la pasinta jaro kaj en aŭtuno por aprobo de la buĝeto kaj laborplano de la venonta jaro.

b. Kie?

La membraro povas kunsidi kie ajn, laŭ la decido de la estraro.

c. Kiel?

- La prezidanto invitas la membrojn al membrokunsidojn per skribita alvoko. La alvoko devas atingi ilin ok tagojn antaŭ la kunsido kaj enhavi la tagardon.
- La sekretario aŭ la protokolanto notas la nomojn de la ĉeestantoj membroj.
- Dum FEL-membrokunsido laŭ libera elekto estas uzata la lingvo Esperanto aŭ la nederlanda lingvo.
- La raporto normale estas redaktita en la nederlanda. Normale la sekretario faras tiun raporton, sed tiu tasko povas ankaŭ esti plenumata de iu alia, se interkonsentite je la komenco de la kunsido. La raporto estos rete, kaj al tiuj, por kiuj tio ne eblas, poŝte sendata.

ĉ. Se membro ne povas ĉeesti la kunsidon, li/ŝi rajtas transdoni sian voĉdonrajton al alia membro per skriba deklaro al la sekretario aŭ per deklaro, kiun minimume du aliaj membroj povas atesti. Tiu membro estas konsiderata kiel ĉeestanta.

d. Membrokunsido povas preni decidojn per aprobo de duono de la ĉeestantaj membroj.

e. La estraro povas ankaŭ peti la opiniojn de la membroj per ĝenerala perpoŝta aŭ reta letero kaj inviti ilin al voĉdonado indikante limdaton por la respondo. La decido validas, se duono de la membroj estas respondintaj antaŭ tiu dato kaj se duono de la respondoj subtenas la proponon.

f. Honoraj membroj de FEL estas invitataj al ĉiuj membrokunsidoj, kie ili povas partopreni per siaj konsiloj, sed sen havi voĉdonrajton.

g. Al membrokunsido povas esti allasataj kiel konsilantoj tiuj personoj, kiuj estas invitataj de la prezidanto.

Regularo pri la Estraro**1. KIO ESTAS LA ESTRARO?**

Konsciante, ke administras la Flandran Esperanto-Ligon (FEL) ĝia membraro, sed ke pro praktikaj kaŭzoj tiu membraro rajtas transdoni la sinokupadon pri ĉiutagaj kaj urgaj aferoj al limigita grupo de siaj anoj, ekzistas tiu grupo, kiu estas la estraro de FEL.

Tiu estraro konsistas el minimume tri FEL-membroj kaj ĝi estas enoficigata principe dum la Ĝenerala Membrokunsido de la printempo. Se dum tiu kunsido de marto la nombro de tri estraranoj ne estas atingita, la antaŭe funkcia estraro provizore plu funkcias ĝis nova estraro estas instalita.

2. KIU POVAS IĜI ESTRARANO?

Estrarano povas iĝi kiu ajn FEL-membro, kiu

- estas komunikinta sian kandidatiĝon por (jes aŭ ne difinita) estrarfunkcio al la sekretario de la antaŭa FEL-estraro;
- apartenas al la membraro, kiu faras tiun estrarelekton;
- ne apartenas al la dungitoj de FEL aŭ al la honora membraro;
- havas bonan scion de la lingvo Esperanto skribe kaj parole.

La membraro elektas siajn estraranojn inter la kandidatoj, laŭ la proceduro formulita en la regularo pri la membraro.

3. FUNKCIOJ EN LA ESTRARO

Tri funkcioj estas klare difinitaj inter la estraranoj: prezidanto, sekretario, kasisto. La prezidanto estas rekte kaj surloke elektata de la membraro; pri la aliaj funkcioj la estraranoj mem decidas, ĉu tuj post la elekto, ĉu en la unua kunsido de la nova estraro. Unu estrarano povas laŭbezzone kombini du el la tri ĉeffunkcioj.

a. La prezidanto

- estas elektata de la membraro, eĉ se ne ekzistas elektita estraro (vidu en ero 1, dua alineo);
- prezidas principe la kunsidojn de la estraro, de la membraro kaj de la membroj;
- povas reprezenti la ligon, kie kaj kiam tio necesas;
- respondecas pri la ĝenerala funkciado de la ligo.

La mandato de prezidanto estas limigata al maksimume kvin sinsekvaj jaroj, sed post interrompo de minimume unu jaro li/ŝi rajtas rekandidatiĝi.

c. La sekretario

- respondecas pri la ĝeneralaj korespondaĵoj kaj invitiloj al la membroj kaj estraranoj;
- respondecas pri la raportoj kaj pri la arĥivoj.

Per decido de la estraro iuj partoj de la taskoj de la sekretario povas esti translasataj al la Esperanto-centro de FEL aŭ al iu alia estrarano, kiu pri tio konsentas.

ĉ. La kasisto

- supervidas la enspezajn kaj elspezajn kontojn de FEL;
- prezentas je la aprobo de la ĝenerala membrokunsido la bilancon de la finiĝinta jaro kaj la buĝeton de la nova jaro.

Per decido de la estraro iuj partoj de la taskoj de la kasisto povas esti translasataj al la Esperanto-Centro de FEL post interkonsento kun ties direktoro, aŭ al iu membro, kiu pri tio konsentas.

d. Aliaj estraranoj

- povas prizorgi specifajn taskojn laŭ interkonsento inter la estraranoj.

4. LA MANDATO

a. La mandato de la estraro estas de unu jaro kaj daŭras principe ĝis la elekto de nova estraro; ĝi finiĝas, kiam la nomoj de la novaj estraranoj estas komunikataj. Ĝi ankaŭ finiĝas, se la nombro de estraranoj pro iu ajn kaŭzo ne plu atingus tri.

b. Estrarano povas eliri el la estraro antaŭ tiu dato, se

- la membraro konsentas pri tio;
- la nombro de estraranoj per tiu eliĝo ne iĝos malpli ol tri;
- la eliro de tiu estrarano ne kaŭzus problemojn por FEL.

La membraro rajtas, en tia kazo, elekti anstataŭantan estraranon dum la koncerna aŭ dum sekvanta membrokunveno, se prezentiĝas kandidato(j) dum tiu kunsido.

c. La membraro rajtas dum kunsido eksigi estrararon antaŭ tiu dato, se ekzistas specialaj kaŭzoj por tio; ĝi rajtas dum tiu kunsido elekti anstataŭanton se prezentiĝas kandidato(j).

ĉ. La prezidanto, vicprezidanto, sekretario kaj kasisto povas esti liberigataj de sia specifa funkcio je propra propono, sed nur:

- se alia estrarano, prefere sen specifa funkcio, pretas preni tiun taskon sur sin;
- se pli ol la duono de la estraro konsentas pri tiu sanĝo;

- se ankaŭ la membraro konsentas pri tio.

d. Personoj elirantaj el la estraro tamen rajtas resti membroj ĝis la sekvonta ĝenerala membrokunsido.

e. Se pro kiu ajn cirkonstanco la nombro de estraranoj malsuperas tri, la membraro devas esti kunvokata ene de unu monato cele de elekto de tria estrarano.

5. LA ESTRARKUNSIDOJ

a. Dum la jaro pluraj estrarkunsidoj okazas. Elektronika interkonsiliĝo povas anstataŭi estrarkunsidojn.

b. La estrara decidas pri loko, dato kaj horoj de la sekvonta(j) estrarkunsido(j). Devas montriĝi, ke almenaŭ la duono de la estraro, inter kiuj la prezidanto aŭ la vicprezidanto, povos antaŭvidi sian partoprenon.

c. La prezidanto povas je propra iniciato aŭ je peto de du estraranoj inviti al estrarkunsido, aŭ al parto de ĝi, iun ajn personon, kiu povus doni specialajn konsilojn aŭ interesajn opiniojn pri iu pritraktota punkto. La direktoro de la Esperanto-centro de FEL estas principe ĉiam invitata kiel konsilanto (do sen decidrajto), krom en la kazoj, kiam la estraro decidus, ke li prefere ne partoprenu en parto aŭ en la tuto; la Esperanto-centro-direktoro povas ankaŭ lasi sin anstataŭi, se li estas malhelpata.

ĉ. La estraranoj partoprenu kiel eble plej regule en la kunsidoj, krom se ili havas iun valoran malĉeestokaŭzon. Estrarano, kiu ne estas partopreninta en pluraj kunsidoj aŭ ofte estas alveninta tro malfrue, meritas esti malrekomendata dum la sekvonta estrarelekto.

d. La estrarkunsido pritraktas:

1. la aferojn, kiujn la membraro komisiis al la estraro;
2. la decidojn pri ĉiutagaj aferoj de la ligo;
3. aferojn de informado, gazetaraj kaj ekspoziciaj servoj, kursoj, eldonadoj;
4. aferojn, pri kiuj ĝi fakte ne estas komisiita de la membraro, sed kiuj havas iun urĝan sencon, kaj pri kiuj ĝi poste raportos al la membraro kaj petos ĝian verdikton;
5. konfirmojn aŭ malkonfirmojn de decidoj de la komisionoj;
6. konsilojn de la komisionoj kaj decidojn surbaze de tio.

e. La prezidanto redaktas la tagordon de la kunsido kaj havigas ĝin al la estraranoj kaj invititoj; je la komenco de la kunsido iu ajn estrarano povas proponi aldoni tagordopunktojn.

f. La decidoj estas prenataj per plimulto de la voĉoj de la ĉeestantaj estraranoj; se iu petas tion, la voĉdonado povas esti farata per sekreta formo; se en decido du voĉnombroj egalas, la opinio de la prezidanto estas decida; se tamen du estraranoj pro serioza motivo ne povis partopreni en tiu kunsido, tiu per egalvoĉeco decidita punkto devas reveni por rekonsidero en sekvonta estrarkunsido, se iu el la estraranoj postulas tion dum la kunsido mem.

g. Dum la estrarkunsidoj oni prefere parolu Esperanton, sed ĉiu ĉeestanto rajtas paroli la nederlandan, se li/ŝi preferas esprimi siajn ideojn tiel la raporto estu redaktata en la nederlanda.

Regularo pri la Proceduro de Estrarelektoj

A. LA ALVOKO

Ĉiujare, en la printempo, la estraro :

invitas la lokajn grupojn kaj la asociojn por indiki siajn reprezentantojn por la Ĝenerala Membrokunveno ; invitas la pasintjarajn membrojn al tiu kunveno, fiksas la tagordon, alvokas kandidatojn por la kooptado kaj por la estrarfunkcioj.

B. KANDIDATIĜO

1. Rajtas kandidatiĝi por funkcioj de estrarano ĉiu membro de FEL aparteninta aŭ supozeble apartenontaj al la membraro, escepte de tiuj, kiuj estas honoraj membroj kaj tiuj, kiuj okupas salajratan funkcion en la sino de FEL.

2. Kandidatoj konatigu sin per skriba deklaro, pri kiu la FEL-sekretario disponu plej laste 24 horojn antaŭ la elektokunsido. Jam je tiu okazo la kandidatoj povas esprimi preferon por iu el la estrarfunkcioj. Se la nombro de sinprezentintaj kandidatoj ne atingas minimume tri, aŭ se specialaj kondiĉoj ne estas plenumitaj, novaj kandidatoj estas akceptataj ĝis la momento de la elekto.

3. Ĉiuj kandidatoj ricevu de la sekretario ekzempleron de la regularo pri la estraro. Per tiu ili konsciu, ke ili devos dediĉi sin serioze al tia tasko kaj devos partopreni la estrarkunsidojn. La kandidatoj ankaŭ konsciu, ke bona scio de la lingo Esperanto estas necesa por aktive partopreni en la kunsidoj.

4. La nombro de kandidatoj ne estas limigita, sed devas atingi minimume tri.

5. La kandidatoj rajtas kiam ajn retiriĝi.

C. LA ELEKTOPREZIDANTO

1. La elektokunsidon prezidas elektoprezidanto, kiu estas prefere la direktoro de la Esperanto-centro kaj en lia neĉeesto, eksestrarano, kiu ne kandidatas por la nova estraro (sinsekve eksprezidanto, -vicprezidanto, -sekretario, -kasisto, -estrarano).

Ĉ. LA NECESA NOMBRO DE KANDIDATOJ

La elektoprezidanto laŭtlegas la kandidatliston kaj konstatas kiuj el tiuj kandidatoj estas anoj de la nova membraro.

1. Se estas malpli ol tri kandidatoj:

En tiu kazo la elektoprezidanto alvokas la ĉeestantajn membrojn por ke iu(j) inter ili kandidatiĝu; je tiu okazo li ankaŭ atentigu, ke prefere prezentu sin kandidatoj, kiuj ebligas, ke estu plenumataj danke al ili iuj specialaj kondiĉoj. Se post tri insistoj restas malpli ol tri kandidatoj entute, eblas nur la elekto de provizora prezidanto (kiu prefere estu la antaŭa prezidanto) kaj la estrarelekto prokrastiĝas ĝis venonta sesio, kiu eble povas okazi pli poste en la sama tago.

2. Se estas minimume tri kandidatoj sed iuj specialaj kondiĉoj ne estas plenumitaj:

la elektoprezidanto alvokas, ke kandidatiĝu iu(j), kiu(j) povus per sia kandidatiĝo solvi la problemon de la koncerna speciala kondiĉo; se post tri insistoj neniu estas prezentinta sin, oni ne plie insistas kaj oni komencas la estrarelekton.

3. Se estas minimume tri kandidatoj kaj se la specialaj kondiĉoj estas plenumitaj, la elekto povas senprobleme okazi.

D. PREZENTADO DE LA KANDIDATOJ

Je invito de la elektoprezidanto la kandidatoj mallonge prezentas sin al la membraro kaj indikas siajn intencojn. Post tio iu ajn membro aŭ speciala invito, kun permeso de la elektoprezidanto, rajtas eldiri rekomendojn aŭ objetojn aŭ fari konkretajn demandojn al iu kandidato.

La elektoprezidanto denove atentigu pri specialaj cirkonstancoj, kiuj eble necesigus elekton de iuj kandidatoj.

E. ELEKTADO

Antaŭa aranĝo

Surbaze de la nombro de kandidatoj kaj de ilia konjektata valoro, la membroj unue decidas pri la nombro de elektotaj estraranoj. Konsilinde estas, pro praktikaj kialoj, ke tiu nombro ne superu ok, eĉ se estas pli da kandidatoj. La decido pri la nombro okazu per manlevo; tiucele la elektoprezidanto citas unue la nombron mem de la kandidatoj, kaj poste sinsekve malaltigas ĝin ĝis kiam iu nombro akiras la aprobon de duono de la ĉeestanta membraro, sed minimume tri.

1. Simpla proceduro

Se la nombro de kandidatoj egalas al la interkonsentita nombro kaj se iuj inter ili plenumas la necesajn kondiĉojn, la elektoprezidanto proponas al la membraro elekti laŭ la simpla maniero, nome akcepti la tutan kandidataron kiel novan estraron. Tiel fariĝos, se du trionoj de la elektorajntoj per manlevo konsentas pri tio.

Se tiu maniero ne estas akceptata, la proceduro daŭriĝas laŭ ero 2 ĉi-sube.

2. Normala proceduro

Se la nombro de kandidatoj estas pli ol ok aŭ se la malplia nombro ne estas akirinta la simplan aprobon

- la kunsido estas interrompata por ebligi al la elektantoj interparoli kaj konscii, ke retiriĝo ĉiam eblas;
- dum tiu interrompo la nomoj de la kandidatoj estas alfabete listigataj sur tabulo aŭ granda papero;
- post tiu interrompo la elektoprezidanto demandas, ĉu iu deziras ankoraŭ fari iun deklaron; post tio oni transiras al la sekreta balotado.

Sekreta balotado signifas, ke ĉiu elektorajnto ricevas slipeton per kiu li povas esprimi sian preferon. Se li estas espriminta la diron antaŭe, tiuj slipetoj estas numeritaj kaj, se dezirite, subskribitaj de la FEL-sekretario; ilia plej alta nombro devas egali al tiu de la registritaj elektorajntoj.

- ĉiu elektanto skribas sur sian slipeton la nomon de la kandidato(j), kiu(j)n li/ŝi preferas kiel estrarano(j), sed ne pli ol estas la interkonsentita nombro. Validas nur la korekte plenigitaj balotslipetoj.

La sekretario aŭ alia tiucele indikita persono, kun la helpo de maksimume tri nekandidatoj, kolektas kaj nombras la balotslipetojn kaj faras pri la rezulto raporteton, kiu

devas esti konfirmata de la helpantoj, kaj kiun li/ŝi transdonas al la elektoprezidanto.

Tiu ĉi laŭtlegas la nomojn de tiuj kandidatoj, kiuj akiris minimume la duonon de la voĉoj kaj la nomojn de la aliaj. Nur tiuj, kiuj akiris tiun duonon estas per tio elektitaj. Se ilia nombro ne atingas tiun de la interkonsentita nombro, oni devas daŭrigi la elekton, sed maksimume du fojojn.

Se por la lasta nombro de elekteblaj estraranoj du (au pliaj) kandidatoj, estas akiritaj la saman nombron da voĉoj, nova sekreta baloto okazu por decidi, kiu inter la du estu elektata; se denove estas egaleco de voĉoj, la plej aĝa estas elektita.

3. Plia voĉdonado

Nur se la nombro de la per tiu proceduro elektitaj estraranoj restas malpli ol tri, aŭ se tiu nombro ne enhavas la necesajn estraranojn por plenumi iujn specialajn kondiĉojn, la elektoprezidanto proponas kompletigan balotadon inter la neelektitaj kandidatoj, kiu okazos laŭ la sama proceduro.

Se post tiu nova elekto la nombro de valide elektitoj tamen restas malpli ol tri aŭ se la specialaj kondiĉoj ne estas plenumitaj, la tuta proceduro rekomenciĝas. Se post tri provoj oni ne atingis la necesan nombron, sekvas invito al nova elektokunsido en la venontaj semajnoj aŭ pli poste en la tago. La estraranoj elektitaj dum la unua elektokunsido ne plu devas kandidatiĝi por tiu nova elektosesio, sed ilia mandato ne ekfunkcias tiel longe, ke kompleta estraro ne ekzistas.

F. ELEKTO DE LA PREZIDANTO,

1. Kiu?

- La membroj elektas la novan prezidanton inter la nove elektitaj estraranoj.
- Prezidanto, kiu jam plenumis tiun funkcion dum kvin sinsekvaj jaroj, ne rajtas kandidatiĝi sen interrompo de almenaŭ unu jaro.
- La kandidato devas kapabli bone esprimi sin en Esperanto, parole kaj skribe.

2. Kandidatiĝo kaj voĉdonado

La elektoprezidanto laŭtlegas la nomo(j)n de la kandidato(j) por la prezidanteco kaj konstatas kiu(j)n inter ili estas valida(j) kandidato(j) sekve de aparteno al la novelektita estraro.

a. se estas nur unu kandidato:

- la elektoprezidanto proponas unue sekretan aprobon; se per manlevo unu triono de la

elektorajntoj subtenas tiun sekretan aprobon, oni agos laŭ la proceduro indikita ĉi-supre en E2;

- se malplia nombro estas petinta tiun sekretan voĉdonadon, la elektoprezidanto proponas, ke la membraro indiku per manlevo, ĉu ili jes aŭ ne akceptas la proponitan prezidanton; tiu ĉi estas konsiderata elektata, se pli ol la duono de la elektorajntaj aprobas lin/ŝin;
- se la kandidato akiras tiun duonon de la voĉoj, la elektoprezidanto povas proklami la novan prezidanton;
- se la kandidato ne akiras tiun necesan duonon, oni agos kiel indikate sub c ĉi-sube.

b. se estas pli ol unu kandidato:

- la kandidatoj ricevas la okazon prezenti sin mem kaj siajn ideojn per iu alparolo;
- ĉiu el la membroj kaj specialaj invititoj rajtas rekomendi iun kandidaton kaj fari demandojn aŭ objetojn;
- poste okazas sekreta balotado laŭ la maniero indikita en E2;
- la kandidato akirinta favoran duonon de la voĉaro da la membraro povas esti proklamata kiel elektita; se necese oni refaru la balotadon inter la du plej bone klasifitaj kandidatoj ĝis kiam iu akiras la duonon.

c. se ne estas kandidato aŭ se la sola kandidato ne estas akirinta plimulton: speciala provo por elekti prezidanton estas farata inter la novaj estraranoj, kaj rekte per sekreta voĉdonado, kiu konformas al tiu de ero E2.

- tiucele ĉiu elektorajnto skribas sur ricevitan slipeton la nomon de la de li/ŝi preferita persono;
- al la estrarano, kiu estas ricevinta la plej altan voĉnombron, sed minimume duonon de la voĉoj, la elektoprezidanto demandas, ĉu li akceptas la verdikton; la elektita persono rajtas rifuzi;
- en kazo de akcepto tiu persono estas proklamata;
- en kazo de rifuzo aŭ de hezito oni rekomencas tiun elektomanieron, sed sen la malakceptinta kandidato, ĝis kiam iu preferita persono, akirinta duonon de la voĉoj, senhezite akceptas; la nombro de sinsekvaj provoj tamen entute ne superu tri;
- se tiaj elektoj ne donas rezulton, la elektoprezidanto petas al la pasintjara prezidanto provizore daŭrigi sian funkcion ĝis sekvonta elektosesio, kiu eĉ povas okazi je la sama tago.

G EBLAJ PROTESTOJ

Eblaj protestoj kontraŭ la elektoj devas esti skribe formulataj ene de du semajnoj post la elektotago kaj esti sendataj al la direktoro de la Esperanto-centro. Ene de unu monato la membraro devas esti kunvokata por decidi pri la valoro de la protesto kaj konkludi pri ĝi.

Begroting 2005:

- in te plakken in papieren versie

- afzonderlijk document v34.begroting2004.pdf in digitale versie